# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

9a jarkolekto n-ro 4
aprilo 1989

## Estraro

Monique Caestecker, prezidanto, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge, ☎ (091) 57 63 84.

Edward Symoens, vicprezidanto, Putsesteenweg 131A, 2180 Kalmthout, ☎ (03) 666 62 66.

Ivo Durwael, sekretario, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, ☎ (03) 440 30 92.

Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, ☎ (050) 33 00 04.

Alex Humet, instruado, van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, ☎ (03) 239 21 69.

Jos Vandebergh, eksteraj rilatoj, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen, ☎ (011) 52 19 43.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldonoj:* Alex Humet, Paul Peeraerts kaj Chris Declerck (Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen)

*Manlibro de la aktivulo:* Marc vanden Bempt (Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, ☎ (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido van Damme (FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, ☎ (03) 234 34 00).

*Rebata servo:* Germain Pirlot (Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, ☎ (059) 70 87 00).

*Prelegvojaĝoj:* Hilde van Ingelgem (Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst, ☎ (053) 70 50 11).

*Turisma servo:* Ivona Kosięba, Gen. Drubbelstraat 105, 2600 Antwerpen, ☎ (03) 218 63 76.

## Estrarkunsido 89 04 15

**Ĉeestas:** Ivo Durwael, Monique Caestecker, Roland Rotsaert, Jos Vandebergh, Paul Peeraerts.

**Financoj:** La evoluo estas pli kontentiga ol en la pasinta jaro. Kreskoj estas klaraj ĉe „Monato", grafikaj laboroj kaj libroservo. Malkresko montriĝas ĉe la kvanto de membrokotizoj.

**Eldonoj:** Jus eldoniĝis „Oktavia". Poste venos la internacia kuirlibro, „Kromosomoj" kaj la Esperanto-gramatiko por franclingvanoj. Pro longa malsano de la grafikisto, kaj pro la pli multaj eksteraj laboroj, baldaŭa pretiĝo ne estas antaŭvidita.

**Kurso por Afrikanoj:** Estis promesita de la antaŭa estraro al Emile van Damme la senpaga preso de lia kurso por Afrikanoj. Montriĝas tamen ke la kostoj iĝas tro altaj. Ivo Durwael petos ĉu Klubo Cent povas pagi la ceterajn kostojn.

**Esperanto-dokumentoj:** ECN proponas, ke FEN kaj/aŭ FEL eldonu „Les réactions psychologiques" de Claude Piron en la nederlanda lingvo. Ivo Durwael skribos ke FEL pretas eldoni la tekston en sia serio de Esperanto-dokumentoj, kaj etos ĉu Nederlando povas liveri la tradukon. FEN, NEA, ECN ktp. povos kiel kutime aĉeti la broŝurojn grandkvante kontraŭ nura kostoprezo.

**Militrifuzantoj:** La estraro decidas ke FEL daŭre estos membro de la asocio *Burgerdienst voor de jeugd*. Tiu ĉi asocio petis al FEL subskribi peticion kontraŭ maljusteco en la nova leĝo pri militrifuzantoj. La estaro decidas ne subskribi ĝin (2 voĉoj por, 2 voĉoj kontraŭ, kun kontraŭa voĉo de la prezidanto).

**Taskodivido:** La nova estraro dividas provizore la taskojn, kiel indikitaj sur paĝo 1 de *Informilo* de aprilo 1989.
Roland Rotsaert preferas nur labori dum la estrarkunsidoj mem. Jos Vandebergh pretas resti ankaŭ post tiuj konsidoj, se necese. Paul Peeraerts provizore transprenos la protokoladon. Ivo Durwael liveros notojn pri la estrara laboro por *Esperanto-Panorama*. Ivo Durwael kaj Monique Caestecker intertelefonos por fiksi la tagordojn de la kunsidoj kaj por priparoli la urĝajn taskojn. Ivo Durwael telefone sciigos la tagordon de la estrarkunsidoj al Marc vanden Bempt.



**Organigramo:** Ĉar kiel kutime neniu grupo reagis al la alvoko en la antaŭa *Informilo*, Ivo Durwael nun telefonos al la grupoj por demandi ĉu okazis ŝanĝoj en la organigrama listo. La organigramo ekde 1989 ne estos sendita kune kun aŭ en *Informilo* sed estos ricevebla de la interesitoj senpage en la Centro.

**Studotago pri grupa agado:** Okazos kiel planite la 20an de majo. Ivo Durwael ankoraŭfoje speciale invitos la diversajn grupojn.

**Kvalifikitaj instruistoj:** Al la listo de kvalifikitaj instruistoj (*Informilo* februaro 1989) aldoniĝu: Helga van der Biest, Joris Raeymaekers, Alfons Beckers, Raymond Steenhoudt. La grupoj estas petataj konigi ankoraŭ aliajn nomojn kiuj mankas en la listo, al la centro antaŭ la 15a de majo.

---

Tiu ĉi protokolo estis tajpita, fotokopiita kaj ekspedita de Flandra Esperanto-Ligo, Grafika Centro Antverpeno, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

---

La Konko : Raporto pri la jaro 1988: "Tia, kia ĝi estis"

La kursoj '87-88 finiĝis la 20-an de majo dum 'malfermita pordo';
'88-89 komencis la 7-an de oktobro : ĉiusemajne por la 18 A-kursanoj, kaj ĉiudusemajne por 18 B-kursanoj, ĉiam vendrede. Manuel Alberto instruas laù la Cseh-metodo por la komencantoj, dum Georgette Alberto-Wybouw gvidas la por-progresantajn vesperojn.

Dum julio kaj aùgusto organiziĝis konversaciaj kunvenoj al kiuj ĉeestis kelkaj eksterlandaj samideanoj. En BRT-radioelsendo "De Golfbreker" s-ro F.Roose intervjuis la ĉinan samideanon Shen Chenru, dank' al la perado de s-ano L. Jansens, radio-teknikisto ĉe la BRT.
Dum niaj kulturvesperoj ni bonvenigis s-rojn Roose kaj Verstraeten; dum lumbildmontradoj fare de la gesinjoroj Alberto-Wybouw, kaj nia franca amiko Claude Martins, ni vizitis Malton kaj Egiption.
En aùgusto ni faris ekskurson al la provinco Henegovio kaj vizitis la kastelon de Attre kaj la subĉielan muzeon pri gaùla-romiaj domoj en Aubéchies. Kelkaj bruĝaj samideanoj akompanis nin.
Delegacioj (de eta ĝis pli multnombra) partoprenis en
- la tago de la Internacia Amikeco en Loveno,
- la serĉpromenado de "La Progreso" en Gento,
- la FEL-kongreso en Gento,
- la Zamenhoffestoj en Bruselo kaj Gento.

La vizito de la ĉina profesoro Zhang Danchen, gastloĝita kun pola studento ĉe la familio D'Hulster, ne pasis nerimarkita de la loka gazetaro.
La 17-an de decembro ni vizitis la ekspozicion "Ĉinio, ĉielo kaj tero" en Bruselo, kaj posttagmeze, la piedoj sur la tero, nin gvidis s-ano L. De Sutter tra la ĉefurba centro.
Du distraj vesperoj (10/6 kaj 30/12) pliviglígis la koran etoson inter la membroj de "La Konko" kaj iliaj gastoj.
Kvin membroj kunlaboris por esperantigi nederlandlingvan referaĵon de ostenda kuracisto. "La estonteco de la medicina profesio je la servo de la homo" (vidu "Esperanto" 1989, febr.p.39) disdoniĝos dum la Internacia Medicina Esperanto-Konferenco (25-29/7/89) en Kortrijk.
Ni renkonte iris al la "ekstera mondo" per agadoj en la lokaj bibliotekoj, per la loka gazetaro, kaj per du allogaj komercaj montrofenestroj en la urba centro dum la monato de majo.
Nia novaĵletero aperis sesfoje po 80 ekzempleroj.
Ni havas 39 klubanojn, 39 estas membroj de FEL.

la 31-an de marto 1989

* * * * * * * *

R. Wylleman

"tia kia ĝi estis" = "zoals het reilde en zeilde", met zijn kwaliteiten en gebreken dus. PIV diras: "la vortoj tia, kia ĉiam montras la kvaliton". Ni aldonas: "kaj la mankojn".

* * * * * * * *